# HEROLDO DE UTENA

**Informilo de BET- 49, 06-07-2013, sabato** *N-ro 1*

## BET ESTAS GRAVA EVENTO



Estimataj partoprenantoj,

Kun granda plezuro – plezuro persona kaj asocia – mi salutas vin ĉiujn, kiuj ĉeestas la 49ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn, okazantajn de la 6a ĝis la 14a de Julio 2013 en Utena, Litovujo.

Jam en la fruaj jaroj de mia esperantisteco, la konata esperantisto Lakshmiswar Sinha rakontis al mi pri la litova pioniro Antanas Poška. Poška loĝis kelkajn jarojn en mia lando, Barato, kaj instruis Esperanton al Provat Ghose. Eble iam ĝuste litovoj helpos nin elfosi pli da detaloj pri Ghose: ni scias nur, ke li esperantigis teatraĵon de Robindronath Tagor, *Poŝtoficejo*, kiu aperis en *Literatura Mondo* (2:33-42) en 1937. Dume, mi men-ciu fakton tute proksiman al viaj koroj: Poška organizis BET-9 en Vilnius, kaj sukcesis altiri tien polajn, bul-garajn, hungarajn kaj finnajn esperantistojn. Ĉar mi estas konata mistifikanto, mi ne diros al vi, kiel mi scias tiun fakton pri BET-9, sed mi ja diru, ke hazarde en tiu sama jaro, 1967, mi lernis Esperanton. Tiu esotera koincido evidente donus al mi naturan rajton privilegie saluti vin eĉ se mi ne estus ĉi-momente prezidanto de via tegmenta asocio.

La Baltiaj Esperanto-Tagoj estas unu el la gravaj eventoj sur la esperantista kalendaro. Mi deziras al ĝi lon-gan kaj buntan vivon! Havu tre agrablan semajnon kune! Kore brakumas vin ĉiujn

Probal Dasgupta
Prezidanto de Universala Esperanto Asocio

## LA PROGRAMO por la 6a de julio (sabato)

**9.00 – 22.00** Registrado de partoprenantoj, loĝigo, informoj – en Utenio pl. 2
**13.00 – 14.00** Tagmanĝo – en Utenio pl. 2
**20.00 – 21.00** Koncerto de muzika trio ASORTI (Visaginas) – en la Muzika lernejo, str. Maironio 11

## LA PROGRAMO por la 7a de julio (dimanĉo)

**8.00–9.00** Matenmanĝo (bufedo, str. Maironio 18)
**9.00–10.00** Organizaj kunvenoj de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj E-kursoj, gvidantoj kaj prelegantoj de la Somera universitato, gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj (ĉefa aŭ-ditorio, Utenio pl. 2)
**10.00–11.00** Malfermo de la Somera universitato. Petras Čeliauskas: "Litova lingvo – la plej arkaika vivanta hindeŭropa lingvo" (aŭd. n-ro AA)
**10.00–11.00** La unuaj lecionoj de ĉiunivelaj E-kursoj. Gvidas Svetlana Smetanina, Mikaelo Lineckij, Stano Marček k. a. (aŭd. n-roj AA, BB, CC)
**11.00–11.30** *Sezonoj* kaj *La Ondo de Esperanto*: Prezentas Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov (aŭd. n-ro AA)
**12.00–13.00** **Solena inaŭguro de BET-49** (Muzika lernejo)
**13.00–14.00** Tagmanĝo
**14.00–15.00** Somera universitato. Aleksander Korĵenkov: "Historio de Esperanto" (Prelego 1)
**15.00–16.00** Lecionoj de ĉiunivelaj E-kursoj
**15.00–16.00** Somera universitato. Alfredas Maruška: "Pri natura medicino"
**16.00–17.00** Somera universitato. Dima Ŝevĉenko: "Sociaj retoj: teorio, historio, perspektivo"
**17.00–18.00** Somera Universitato. Ed Robertson: "Kio okazas en Skot-lando?"
**20.00–21.00** Koncerto de la ensemblo *Vieversa* (Muzika lernejo)

## MUZIKA TRIO EL VISAGINAS



La kultura programo de la BET-49 estos vere elstara. Krom la jam anoncita partopreno de la esperantistaj artistoj Manŭel (Emanuele Rovere, Italio), Mikaelo Bronŝtejn (Ruslando), Miĥail Povorin (Ruslando) kaj Solotronik (Eduardo Vargas, Hispanio), en BET-49 koncertos ankaŭ la konata esperantista muzika grupo ***Asorti*** el la Litovia urbo Visaginas.

*Asorti* fondiĝis en la jaro 1982a jaro. Unue ĝi prezentiĝis en la 1992 dum la kultura aranĝo *Muzo* (Vilno, Litovio) kaj en 1993 dum la Turisma Foiro (Pollando). *Asorti* estas ofta koncertanto dum esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj en Litovio kaj en pli ol 20 landoj: Aŭstrio, Britio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Israelo ktp.

*Asorti* estas tripersona familia grupo: la gepatroj **Edvardas Piščikas** kaj **Elena Piščikienė** kun la filo, muzika virtuozo **Edgaras Piščikas** La grupo kantas en la folka stilo. *Asorti* eldonis kelkajn kasedojn, muzikajn albumojn en Esperanto: *Se povus mi* (1994), *Edgar + Asorti* (1995), *Ni denove renkon-tiĝos* (1995, *Lernejaj amikoj* (2005), *Kantu kune* (2007), Verda Hejmo (2009).

## ESPERANTO KURSOJ

Por komencantoj instruos la redaktoro de la revuo *Esperanto* **Stano Marĉek** el Slovakio, kies rektan instrumetodon kaj lernolibron *Esperanto per rekta metodo* oni jam konas en pli ol tridek landoj.

Kun tiuj esperantistoj, kiuj kapablas paroleti Esperanton, sed volas pli profunde lerni la lingvon, laboros **Svetlana Smetanina**, la nuna prezidantino de Rusia Esperantista Unio, konata kursgvidantino kiu multege instruis en pluraj landoj.

La kurson por la nivelo B2 gvidos **Mikaelo Lineckij** – konata esperantisto el Ukrainio, sperta instruisto kaj organizanto de Esperanto-aranĝoj.

La lingvaj kursoj okazos ĉiutage krom la ekskursa tago. Bonvenaj estas ĉiuj, kiuj deziras eklerni la lingvon aŭ perfektigi siajn lingvokonojn. Kuraĝigu unu la alian partopreni en la kursoj, ĉar tio estos bonega okazo ne nur lerni dum la kursohoroj, sed ankaŭ tuj elprovi praktike la akiritajn konojn.

*Gražina Opulskienė*

## JUNULARA POPOLA ENSEMLO



Ekde 1996 en Kultura Centro de Utena funkcias danc-kanta ensemblo ***Vieversa***, en kiu nun koncertas pli ol 130 ensemblanoj. La plej junaj el tiuj estas 5-jaruloj, la plej aĝaj – 19-jaruloj. Diversajn trupojn gvidas koregrafino **Roberta Macelienė**. En la programoj estas popolaj dancoj, ludoj kaj kantoj de diversaj Litoviaj regionoj.

Ĉiun duan jaron la ensemblo en sia urbo organizas internacian infanan kaj junularan festivalon de naciaj dancoj *Po vasaros dangum* (Sub la somera ĉielo). La ensemblo mem partoprenis internaciajn festivalojn en 16 landoj. Dum kelkaj lastaj jaroj - en Greklando, Francio, Tuniso. La plej impresa estis la 17a festivalo *Cita di Vita* en Cicilio (Italio). Memkompreneble, la ensemble multe koncertis ankaŭ en diversaj lokoj de Litovio mem.

## MANĜU, TRINKU, GEAMIKOJ!

Loĝlokoj, kunvenejoj, manĝejo estas proksime unu de alia kaj estas facile atingeblaj perpiede (vd. la urboplanon sur la 4a paĝo)..

Matenmanĝo por partoprenantoj de BET-49 okazos en bufedo de la studenta domo (str. Maironio 18 ). Tagmanĝo okazos en manĝejo de la Kolegio (Utenio pl. 2). Menuo samos egale por ĉiuj.

La unua manĝoservo por BET-anoj estas tagmanĝo la 6-an de julio, la lasta servo estas matenmanĝo la 14-an de julio.

Vespermanĝo ne estas organizata – oni povas tion libere kaj laŭelekte memstare fari en urbaj kafejoj kaj restoracioj. Ekzemple en manĝejo-kafejo de litovaj naciaj manĝaĵoj *Irmusta* (Maironio g. 17) aŭ prosima al kolegio kafejo *Žarija* (Braĝo, K.Ladygos g. 2).

**Kelkaj utilaj litovaj vortoj kaj frazoj**

Saluton – Labas
Bonan tagon –Labą dieną (la`ba dje`na)
Dankon – Ačiū (a`ĉju), dėkui (de`kuj)
Bonvolu – Prašom (pra`ŝom)
Pardonu – Atsiprašau (atsipraŝaŭ`)
Bone – Gerai (geraj`)
Tre bonguste – Labai skanu (labaj` skanu`)
Ĝis revido – Viso gero (vi`so ge`ro)

## LA TUTTAGA EKSKURSO

La 10-an de julio (merkrede) okazos la tuttaga ekskurso tra la laga regiono de la orienta **Aŭkŝtajtio** (laŭvorte - Suprajxujo). Dum aliaj tagoj okazos kelkaj surlokaj duontagaj ekskursoj. La eksursontoj povos ĝui la belecon de Litoviaj lagoj. La itinero de la ekskurso estas jena: Utena – Sudeikiai – Zarasai – Stelmužė – Rokiškis – Leliūnai – Utena.

**Sudeikiai** estas urbeto ĉe la belega lago *Alaušas*. Ni vizitos la artan galerion de Sudeikiai. En ĝi ĉiujare okazas tre popularaj renkontiĝoj de pentristoj, kies verkoj estas ekspoziciataj en la arta galerio. Sekvos prezentado de bierfarado kaj gustumado de bieroj. Poste per floso ni navigos al insulo de la lago *Alaušas*. kie oni regalos nin per fiŝsupo de fiŝoj el ĉi tiu lago.

**Zarasai** estas distrikta centro, ĉ. 50 km de Utena. Ĝin ĉirkaŭas lagoj. En 2011 tie estis inaŭgurita ĉirkaŭrigarda promenrado de – unika konstruaĵo en Litovio. Promenante laŭ ĉi tiu rado, kiu estas 34 metrojn larĝa kaj 17 metrojn alta, eblas vidi panoramon de la lago Zarasai. En la akvomuelejo *Šlyninka* – pli ol 300-jara unika konstruaĵo – eblos gustumi ĵus bakitan panon. En la vilaĝo Kvintiškiai ĉe la lago Ilgis estas loko de apero de Sankta Maria.

En **Stelmužė** estas la plej maljuna kaj la plej dika kverko en Litovio, unu el la plej maljunaj kverkoj en Eŭropo. Oniopinie ĝi aĝas pli ol 1500 jarojn. Apude staras unika lignaj sonorilejo kaj preĝejo, konstruitaj nur perhakile.

La ĉefa vidindaĵo de **Rokiškis,** la disktrikta centro, estas la novgotika preĝejo de S-ta Mateo. Ĝia interno estas plena de artaj valoraĵoj. Ni vizitos ankaŭ palacon de klasika bieno, en kiu lokiĝas landesplora muzeo de Rokiškis kaj ekspozicio de la fenomena lignoskulptisto **Lionginas Šepka**.



La urbeto **Leliūnai** famas pro la plej alta preĝejo de Utena distrikto. Ni vizitos la muzeon de ceramiko kaj tie ekscios ne nur historion de ceramiko kaj ties misterojn, sed ankaŭ povos eksidi ĉe speciala malnova ilo kaj fari la unuan poton en sia vivo.

*Antanas Visockas*

## EKSKURSO AL OBSERVATORIO

La 12-an de ju-lio, 2013 ( vendrede ) dezirantoj povos ekskursi al famekonata observatorio de **Molėtai** – la proksimurbo de Utena.

La ekskurso celas observadon de steloj, ĝi ko-



menciĝos je la 23.30 horo kaj daŭros horon kaj duonon. Estas planata ne pli ol 30-persona grupo. La ekskurso kostas 350 lidojn por la tuta grupo. Se esperantistoj suficos por formi la grupon, ĝi estos fermita grupo nur de esperantistoj. Se ne, povos aliĝi ankaŭ fremduloj. Se vetero ne taŭgus por spektado de steloj, ni vizitos nur etnokosmologian muzeon, ekspozicion de teleskopoj k.s., tiukaze prezo de la ekskurso estos pli malalta. Dezirantoj partopreni la ekskurson anoncu sin al Jolanta DUDĖNAITĖ rete jolanjo@gmailcom aŭ telefone +370 684 98027 .

## LA FAMA ANTANAS POŠKA – 110




Unu el nemultaj litovaj esperantistoj, kiuj jam eniris la internacian E-historion estas **Antanas Poška** (24.03.1903 – 16.10.1992).

A. Poška kun Esperanto renkontiĝis estante 10-jara knabo. Dum 1926-1929 li studis medicinon en Litovia Universitato, gvidis E-kursojn. Li zorgis pri ĉiusemajna E-elsendo "Nia anguleto"de Kaŭna radiostacio kaj estis ĝia parolisto (1926-1929, 1938-1940). Pretigis kaj eldonis Esperanto-ŝlosilon por litovoj (1929, 1969, 2003).

En 1929 li. kune kun ĵurnalisto M. Šalčius, entreprenis motorciklan vojaĝon tra Eŭropaj landoj, Egipto, Sirio, Turkio, Irako kaj Irano al Hin-dio. Ĉie li havis utilajn kontaktojn kun lokaj es-perantistoj. Kunlaboris kun loka gazetaro. Dum 1931-1933 li studis antropologion en Mumbaja universitato, en Barato gvidis E-kursojn.

Reveninte el Hindio, A. Poška en 1926 iĝis ĉefdelegito de UEA kaj prezidanto de Litova Esperanto-Asocio (1937-1940). Dum 1965-1969, li prezidis Vilnan E-klubon.

En 1940 A.Poška penis savi Zamenhofajn familianojn de nazioj kaj poste donis azilon al multaj judoj, rifuĝĝintaj el Vilna getto. Tamen en 1946 li kiel "malamiko de soveta popolo" estis arestita kaj ekzilita en sovetan koncentrejon.

Siajn vojaĝojn li prezentis en litovlingva libro *De Baltmaro ĝis Bengalio* (la unua volumo en 1939, la 8-a en 2012). En 1979 A.Poška ekverkis en Esperanto vojaĝlibron "Ni ĉiuj estas fratoj". Ties fragmentojn li publikigis la revuo "Litova Stelo". La vojaĝlibro aparte ne estis publikigita.

## PLI OL DU CENTOJ ALIĜIS AL UTENA

Ĝis la 24-a de junio 2013 **al BET-49 aliĝis** 204 personoj el 19 Eŭropaj landoj. Nome: 147 el Litovio; 15 el Latvio; 9 el Rusio; 6 el Ukrainio; 5 el Finnlando; po 3 el Estonio, Francio, Svedio; po 2 el Bjelorusio kaj Pollando; po unu el Belgio, Britio, Hispanio, Italio, Rumanio, Slovakio kaj Skotlando.

Laste aliĝis ankoraŭ: ............

## PLENA MILO ALIĜIS AL REJKJAVIKO

Mil kongresanoj el 55 landoj aliĝis al la 98-a UK de Esperanto en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko de la 20-a ĝis la 27-a de julio. Kvankam la 98-a UK okazos en Eŭropo, plej multe da kongresanoj liveris tamen Japanio, kiu kun 97 aliĝintoj ĝis nun ankoraŭ povos superi 100, verŝajne kiel la sola lando. Sur la dua loko estas Francio (88) kaj sur la tria Germanio (83). Alte, kiel la kvara, en la statistiko staras Ĉinio kun 59 aliĝoj. En Rejkjaviko ĉeestos eĉ pli da ĉinaj kongresanoj ol pasintjare en Hanojo. La nombro de aziaj aliĝintoj estas ĝis nun 190, t.e. preskaŭ unu el kvin.

Aliaj landoj kun minimume 19 aliĝintoj estas Italio (44), Nederlando (42), Svedio (39), Usono (37), Pollando kaj Rusio (po 35), Finnlando (30), Belgio kaj Brazilo (po 28), Svislando (27), kaj Britio kaj Ĉeĥio (po 25), Danio (22), Kanado (20), Litovio kaj Norvegio - 19 aliĝintoj.

KLARIGAJ NOTOJ:

1- busa stacidomo
2- kolegio de Utena
3- muzika lernejo
4- gastejo “Utrana”
5- studenta domo Nr.1
6- studenta domo Nr.2

---

**Vetera prognozo**

Por la 6-a de julio (sabato)

Ombraj senpluvaj mateno, tago, vespero. Temperaturo + 17-19◦

Por la 7-a de julio (dimanĉo)

Mateno serena, tago ombra, vespero duonombra. Senpluvaj. Temperaturo + 16-19◦

---

Verku kaj fotu por *HdeU* !
Redaktoro
Vytautas Šilas,
+370 611 75500
vilnastelo@yahoo.lt

